



PILO-PRESS

Interncia Inform servo



Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 9/1973 26 feb 1973
Aperas ĉiusemajne

Nikolai Kopernik
1473 - 1973

Pensoj okaze de la Kopernik-Jaro

Nürnberg. (PP) La mondo celebras la Kopernik-jaron sub la aŭspicio de UNESCO. En multaj landoj, ne nur en Pollando, okazis manifestacioj kaj el la paroladoj aŭdiĝis la opinio, ke tiu genia homo kaj sciencisto ne apartenas al unu lando, sed al la tuta mondo. Laŭ nia opinio prave oni konsideras Kopernik mondĉivitano. En la tempo, kiam li vivis, studis kaj laboris, eblis libera vojaĝado de lando al lando, de urbo al urbo, de universitato al universitato, almenaŭ por tiuj kiuj disponis pri la financaj rimedoj kaj kiuj regis la sisteman universalan lingvon, la latinan. Jes, antaŭ 500 jaroj ekzistis por sciencistoj kaj studentoj komuna lingvo. Speciale ni esperantistoj memoru pri tiu fakto, kiu estas por ni kaŭzo ankaŭ celebri la 500an datrevenon de la pola astronomo.

Cetere, la verko de Kopernik "De revolutionibus..." estis unue presita en Nürnberg. Tiu fakto eble estis la kaŭzo, ke la ĉefa Kopernik-celebrado de FRG okazis ĝuste en tiu urbo, la 19 feb 1973. Simile, do, al Esperanto kaj Zamenhof, la urbo Nürnberg ludis ankaŭ rilate al Kopernik kaj sia verko certan rolon...Kaj Pilo-Press volis atentigi pri tio.

ILUSTROWANY KURIER POLSKI

18-19 LUTEGO 1973 R.

„GERMANA ESPERANTO - REVUO" O POLSCE

W NRF wychodzi niezależne czasopismo esperanckie pt. „Germana Esperanto-Revuo" (Niemiecki Przegląd Esperancki). Miesięcznik ten, redagowany bardzo interesująco, zawiera wiele publikacji i informacji o ruchu esperanckim w NRF i w świecie. Dużo uwagi poświęca również polskiemu ruchowi esperanckiemu. M. in. zamieszcza nowy konkurs Polskiego Radia z nagrodami, wśród nich 10-dniowe wycieczki po Polsce.

Konkurs dotyczy międzynarodowej współpracy pokojowej i roli Polski w tej współpracy.

Germana Esperanto-Revuo pri Pollando

NOWOCZESNA NAUKA - JEZYKA ESPERANTO

W wyższej uczelni w Paderborn (NRF) w styczniu rozpoczął się intensywny kurs esperanta dla nauczycieli i studentów językoznawstwa i pedagogiki. Lektje prowadzone są przy pomocy urządzeń elektronicznych do nauki języków obcych. Korzysta się z najnowszych metod nauczania esperanta.

Pri la Esperanto-kurso en Paderborn

Esperanto-informoj en Ilustrowany Kurier Polski

Ankaŭ dum februaro aperis en tiu pola gazeto informoj pri Esperanto, ĉerpitaj el Pilo-Press. Krome aperis en la eldono de la 23 feb 73 ampleksa artikolo pri la pola kontribuado al la Esperanto-literaturo plume de Kazimierz Małycha.

Estraraj diskutoj ne plu konfidencaj

Rotterdam (PP) Dum sia decembra kunsido la estraro de UEA decidis, nuligi la principon de konfidenceto en la laboro de la estraro. Tio signifas, ke oni komunikos al la Komitato ĉiujn decidojn de la Estraro. Tamen la kunsidoj de la estraro ne estos publikaj.

O ESPERANCIE W TELEWIZJI NRF

Telewizja NRF w swoim drugim programie poświęca nieco miejsca również esperantu. Już nagrane zostały wywiady o tematyce języka międzynarodowego. M. in. dr Werner Bormann, przedstawiony został przed przyszłym pałacem kongresowym w Hamburgu w którym w 1974 r. odbędzie się 59 Światowy Kongres Esperantystów. Obszerniejsze informacje na ten temat podaje agencja esperancka „Pilo-Press".

Informo pri la elsendo de ZDF kun la elpaŝo de d-ro Werner Bormann

O ESPERANTO DO SZKÓŁ WŁOSKICH

Włoski minister oświaty publicznej Oscar Luigi Scalfaro przyjął na audjencji delegację włoskiej Federacji Esperanckiej z prezesem Federacji inż. Giordano Azzi. W skład delegacji weszli również wybitni naukowcy włoscy, poeta esperancka oraz kierownik redakcji esperanckiej Radia Rzym.

W czasie audjencji omówiono sprawy związane z projektem wprowadzenia esperanta do szkół włoskich. W parlamencie przygotowano już odpowiedni projekt ustawy, który poddany będzie pod dyskusję poselską.

Po audjencji dalsze rozmowy już o charakterze technicznym prowadzone były - jak donosi agencja „Pilo-Press" - z dyrektorem Gabinetu Ministra.

Audienco ĉe la itala ministro Luigi Scalfaro, pri kiu P P sia tempe raportis.

Demokratiĝo en la laboro de UEA

En cirkulero al la komitatanoj kaj observantoj de UEA de la 4 feb 73 la prezidanto de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna, nomas la decidon nuligi la konfidencecon de la estraraj diskutoj antaŭ la komitato "plian demokratiĝon en la laboro de UEA." Samtempe li esprimas la esperon de la Estraro de UEA, ke tiu ĉi grava principa decido havos pozitivan efikon.

Por eviti miskomprenojn ni citas ĉi-loke la oficialan resumon: "La Estraro decidis nuligi la konfidencecon de la estraraj diskutoj antaŭ la Komitato kun escepto de unuopaj decidoj, kiuj pro specialaj kaŭzoj, precipe personaj, postulas konfidencecon, kaj liberigi de konfidenceco antaŭ la Komitato ĉiujn antaŭajn protokolojn en la historio de UEA, escepte de tiuj partoj, kiuj povas malutili al la personaj reputacioj de unuopaj personoj."

Esperanto kaj Politiko

En la sama kunsido la Estraro de UEA decidis reveni al la antaŭa principo, ke ne aperu en la revuo "Esperanto" recenzoj pri verkoj, kiuj laŭ la prijuĝo de la ĉefredaktoro estas nete politikaj.

Pri religiaj verkoj plue validas la decido de aprilo 1972, ke povas aperi neŭtralaj recenzoj.

Rilate lingvopolitikajn demandojn la Estraro decidis lasi al la prijuĝo de la ĉefredaktoro, ĉu nur menciigi la koncernan verkon aŭ publikigi recenzon, depende de ĝia karaktero kaj la intereso de Esperanto-movado.

Prelegvojaĝo tra Finnlando

Turku (wb) La UEA-estrarano por landaj asocioj, d-ro Werner Bormann, Hamburgo, faris kun sia edzino unusemajnan rondvojaĝon tra Finnlando (12 - 19 feb 73). Ĉefcelo estis partopreno en la ĉi-jara finna Esperanto-kongreso kaj la festprelego tie. Survoje li kaj lia edzino vizitis kvar gravajn urbojn: Turku, Tampere, Jyväskylä kaj Kuopio. En ĉiuj urboj d-ro Bormann donis - post bonega preparo de lokaj esperantistoj - intervjuojn al gazetoj, tiel ke la vojaĝo estis abundege signita de sia gazetara eĉo. La finnaj esperantistoj opinias, ke tiu publikiga laboro bone helpas la Esperanto-laboron en sia lando. D-ro Bormann ankaŭ prelegis germanlingve pri ĝeneralaj lingvaj (ne Esperanto-) temoj en la lingva instituto de Tampere, la universitato de Jyväskylä kaj la german-finna societo de Kuopio (en kiu estas la gimnaziaj instruistoj por la germana) kaj substrekis tiun ĝeneralan fakulecon antaŭ ĉe la gazetaroj. Tiel eblis lerte atentigi pri Esperanto sen tedi legantojn pro troa esperanteco. Tiu kombino evidentiĝis kiel tre favora. En la Esperanto-klubo ĝenerale s-ino Elsbeth Bormann prelegis pri urboplanado en tiu parto de Hamburgo, kie ŝi kunrespondecas kiel deputino. Ankaŭ tio imponis en la redakcioj.

La Monda Lingvo-Problemo: Aperis n-ro 11, vol. 4 kun 5 ĉefartikoloj, i.a. "Können Computer das Sprachproblem lösen de Michael Zeilinger, Fürth/B. (Ĉu komputoroj povas solvi la lingvo-problemon?)

Finna Esperanto-Kongreso

Lahti(wb) Luksa hotelo en Lahti (urbo kun 90.000 en-loĝantoj)(17 - 18 feb 73)*kun la nomo "Vintraj Tagoj". Duono el la pli ol 100 kongresanoj loĝis en la hotelo, kiu disponigis la necesajn salonojn. La kongreso daŭris de sabato tagmezo ĝis dimanĉo tagmezo. La programo konsistis el urba rondveturado, kunvenoj de apartaj grupoj, festvespero kun deklamaĵoj, kantoj kaj prelego "La urboplanado en Germanio" de s-ino E. Bormann. Dimanĉe matene d-ro W. Bormann prelegis pri "la estontaj perspektivoj por la Internacia Lingvo".

La jarĉefkunveno elektis novan estraron: Prezidanto nun estas s-ro Pekka Virtanen el Kuopio, juna instruisto, kiu sperte organizis la lastjaran SAT-kongreson. Li sekvas s-inon Irja Klemola, multjara prezidantino, kiu pro siaj altaj meritoj fariĝis honora prezidantino de Esperanto-Asocio de Finnlando. Nova sekretariino estas s-ino Meta Kesälä post s-ro Jorma Ahomäki, kiu pro tro da profesia ŝarĝo demisiis. Kun ŝi la reprezentantino de la instruistoj, s-ino Tyynelä, estas nun du sinjorinoj en la estraro.

La laboro en la amasmedioj

Salzburg (FF) De la 17 - 24 aprilo 1973 okazos la 5-a Internacia Junulara Renkontiĝo, Germana - Aŭstria, en Berchtesgaden - Salzburg.

Loĝejo estos Jugendheim Seimler, 824 Berchtesgaden-Salzburg.

Programo: Dancado kun esperanta disko-ĵokeado, gvidado tra la urbo Salzburg, vizito al redakto kaj presejo de "Salzburger Nachrichten", Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresintoj, Laborgrupoj: Radio - Gazetaro

Kotizoj: ĝis 15 mar 73 post 15 marto 73

malpli ol 25-jaraj	GM 95,--	GM 105,--
pli ol 25-jaraj	GM 105,--	GM 115,--

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas: Anton Oberndorfer, A-4600 Wels, Ferdinand-Wiesingerstr. 15, Aŭstrio.

Esperanto subtenata de registara partio

Romo (adeso) La 7-an de februaro havis lokon en Romo renkontiĝo inter delegacio de esperantistoj apartenantaj al la itala socialdemokrata partio (P.S.D.I.) kaj vicministro NICOLAZZI, kiu estas unu el la estraranoj de tiu partio, kaj siatempe prezentis leĝproponon por enkonduko de Esperanto en la italajn lernejojn. - Oni devas enfazi, ĉi-rilate, ke la itala socialdemokrata partio partoprenas en la registaro, kaj do ĝi havas aparte interesan pozicion rilate la gravecon de ĝia pritakso de la diversaj problemoj de la itala socio. Aliflanke ĝi estas la itala sekcio de la Socialisma Internacio, kaj do ĝi havas aparte oftajn kaj konstantajn rilatojn kun la santipaj eksterlandaj partioj. Oni petis de la vicministro taŭgan agadon favore al rapida pridiskuto de la leĝpropono pri Esperanto, ĉu per interveno ĉe la minsiteriaj instancoj, ĉu per oportuna stimulado de la komisionaj membroj, kiuj devas priekzameni la leĝproponon.

Milito kontraŭ angla lingvo en Esperanto

estas la titolo, kvarkolumna, de artikolo aperinta en la prestiĝa ĵurnalo "La Stampa", eldono de la urbo Novara (Piemonto, inter Torino kaj Milano). La artikolo, kiu estas akompanata de granda kaj trafa bildo de du junaj interparolantaj geesperantistoj, Michela Lipari el Novara kaj Anton Oberndorfer el Aŭstrio, raportas pri bone sukcesinta publika prelego, kiu okazis la 10-an de februaro en la inda sidejo de loka instanco, pri la temo "Fremdaj lingvoj en la italaj lernejoj: politikaj kialoj kaj sociaj postsekvoj". En la artikolo, tre favora al Esperanto, oni amplekse mencias la tezojn de la esperantistoj koncerne la neceson eviti kulturon nur unudirektan, kaj malferrigi al la mondo pere de la internacia lingvo.
(Radio Roma, Kuriero de Esperanto)

Foiro de Milano

Milano (PP) Ankaŭ ĉi-jare la Foiro de Milano varbas per Esperanto-afiŝo kun la teksto: Internacia Centro de la Interŝanĝoj 14an - 25an de aprilo 1973.

La Semajno en la Radio.

Ĉi-foje ni ne volas komenti la elsendojn, sed ni volas paroli kelkajn radio-staciojn mem.

Emilija Lapenna, parolistino de Radio Zagreb, en kontribuaĵo por Germana Esperanto-Revuo i.a. skribas: "Se ĉiuj esperantistoj nur unufoje jare memorus elsendojn preparitajn por ili, kelkaj radio-stacioj, kiuj ĉesis elsendadi Esperantan programon pro manko de subteno, estus ankoraŭ sur la listo de radio-stacioj elsendantaj en Esperanto...
...La sola publikaĵo, havanta konstantan observon pri Esperantlingvaj radio-elsendoj, estas Informa Servo de Pilo-Press. Ĝi, tio ne estas kritikoj havantaj literaturan kvaliton, sed simpla al ĉiu komprenebla mencio pri la aŭdita programo. Koregan dankon al Pilo-Press kaj ĝia raportanto."

Pola Radio, Varsovio, informas: "Lige kun la enkonduko de la poŝt-kodo en Pollando, ni petas la aŭskultantojn adresi la korespondaĵojn al nia Redakcio jene:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, 00-950 Varsovio 1, Box 46, Pollando.

La utiligantojn de nia servo de la "Koncertoj laŭ bondeziroj" ni afable petas laŭeble uzi niajn "mendilojn", kiujn ni volonte disponigos en la dezirata kvanto.

Por "Esperanto-ekspresoj" ni plue akceptas informojn pri tutlandaj kaj lokaj E-aktivecoj. Ni aŭdigas ilin en la kutinaj rubrikoj "Niaj aŭskultantoj sciigas", "Klubo - la bazo de nia movado", "El la junulara E-movado", "Esperantistaj asocioj tra la tuta mondo".

Por niaj "Leterkesto" ni volonte akceptos viajn informojn, kiuj rilatas la polan aŭ internacian problemaron, nian E-programon aŭ la E-movadon. Se tenas pri la pola problemaro ni ankaŭ kun plezuro akceptos viajn informojn pri polaĵoj en via lando... Ni deziras per tio krei en niaj "Leterkesto" interŝanĝejon de informoj rilatantaj al nia lando, kio estus tiom pli interesa, ke kontribuu al ĝi per siaj leteroj diverslandaj esperantistoj."